

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale  
PLENUMITA 04/03/2021 Kvincentdudeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



Entute **823,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **294,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **244,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **219,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **66,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO EL LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



N.ro 25 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKA KVIZETO: Kiom da eraroj estas en la sekvanta peco, kaj kiuj?

" Sur la supron de la monto ni nun estas portantaj grandan Esperanto-flagon, kiun ni ankoraŭ havis de post la kongreso en Tokio kaj kiu donatis al ni de la Tokia Esperanto-Klubo. Ni ĝojas povi ĝin uzi ĉi tiun tagon. Ni ĝin trovas tro peza por ĝin transporti en la flugmaŝino al la baldaŭa Kongreso. "



Vi trovos la solvon de la kvizeto ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E.520.

*Marcel Leereveld.*



## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.



*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*




## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 6a de marto estos la unua sabato. Venu! Unu taso da klubpagita kafo atendis vin.

**Roger Springer**



Ne sekura? Kial iu aldonis tiun averton al nia **Esperantaretradio**? Kial, Kial, Kial?

<http://esperantaretradio.blogspot.com/#!>

Spite la averton, estis 32000 aŭskultoj dum la pasinta monato.

Vere, espero estas la plej malbona el ĉiuj malbonoj, ĉar ĝi plilongigas la turmentojn de la homo.

**Friedrich Nietzsche**



## Respondo al artikolo de Marcel en AE519 pri privataj lernejoj

Saluton Roger, jen estas respondo al artikolo de Marcel en AE519 pri privataj lernejoj.

Mi estas instruisto en elementa lernejo. Mi nun instruas en privata lernejo, sed en la pasinteco mi instruis en registaraj lernejoj. Mi havas intereson pri aliaj elektoj por gepatroj kiu volas eduki siajn infanojn ekster la sistemo de registaraj lernejoj.

Mi konsentas ke la lernejo-sistemo en Aŭstralio ŝajnas neĵusta por multaj homoj, kaj eks-lernanto de privata lernejo eble havas plibonon okazon por trovi bonan oficon. Tamen la maniero -- la 'mezurilo' -- kiun Marcel uzas por alveni al sia konkludo ne estas preciza.

Lia konkludo -- ne skribita, sed ja komprenita -- estas ke ni en Aŭstralio ne havu privatajn lernejojn. Ni nur havu publikajn lernejojn. Tiu donos, aŭ helpos doni 'bonfarton de la socio'.

Tiu ideo estas la sama kiel ideo de la *Manifesto de la Komunista Partio* de 1848. Jen la '10-a tabulo' de tiu manifesto, kiu komencas: "Senkosta edukado por ĉiuj infanoj en registaraj lernejoj."

Do, la ideo ke universala, libera, registara lernejo estas kiel por 'bonfarto de la socio' estas komunista. Ni ja havas registarajn lernejojn por ĉiu infano en tiu lando pro la klopodo de subtenantoj de komunismo en la 18-a jarcento. Ankaŭ la 'kelkaj specialistoj pri eduka scienco' kiujn Marcel menciis ja ankaŭ subtenas komunismon. Subtenantoj de komunismo abundas en la kampo de edukado.

La artikolo de Marcel enhavas senkontestajn supozojn, kiuj subtenas komunismon. Mi skribas pri nur unu ĉi tie: Kial oni supozu ke la tasko de la edukado de infanoj apartenas al la registaro? Kial ne al la ĉefaj zorgantoj -- kaj amantoj -- de infanoj: iliaj gepatroj?

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**







potencoj, en nia kazo la usonaj internaciaj kompanioj kaj bankoj, kiuj ja estas fortegaj. Nuntempe oni vidas en Aŭstralio pli da sekreteco en la registaroj, rezultanta en pli da potenco de la grandegaj kompanioj precipe internaciaj. La registaroj volas redukti ankaŭ nian esprimliberecon, pro la samaj kialoj. Tio afektas i.a. nian partoprenon en eksterlandaj militoj.

**Marcel Leereveld.**

## LA PERFEKTA ANGLA LINGVO .

Ĵussemajne en “Enigmo” mi demandis, ĉu la angla lingvo estas perfekta ankaŭ en “*The letter is now (being) returned*”, kun la Participo “*returned*”; ni lernis ja en la lernejo, ke tiu participo en pluraj eŭropaj lingvoj (i.a. la angla) estas “*Past Participle*” . Jen la respondo.

Kompreneble la etnaj lingvoj estas perfektaj. En ili unu vorto havas kelkfoje du (aŭ eĉ pli) funkciojn, do du signifojn. Ekzemple la angla vorto “*past*” povas esti Substantivo, kiel en “*in the past*” (= la tempo antaŭ nun), aŭ Adjektivo, kiel en “*the past performance*” (= “la ĵus pasinta”), aŭ Adverbo, kiel en “*he ran past*” (= “pasante”), aŭ kiel Prepozicio, kiel en “*he lives past the next road crossing*” (= “pli malproksime ol”). En ĉiu funkcio la signifo de la kvar vortoj estas malsama, do ili vere formas kvar vortojn (samformajn).

Krom funkcii kiel substantivo kaj kiel adjektivo kaj kiel adverbo, la verba participo funkcias en eŭropaj lingvoj en du situacioj: **1.e.** en la funkcio de sufikso, kaj **2.e** kune kun alia vorto formante unu novan vorton dum perdante sian originan signifon. En la unua kazo, kiel en la hispana kaj Esperanto, la participo jam formas sufikson kun la verbo por formi la Pasivan Voĉon: “*La letero nun retrosendATas*” (kaj retrosendatis/os/us/u), dum en aliaj eŭropaj lingvoj la Pasiva Participo formas memstaran vorton por indiki la pasivecon: “*The letter is now (being) returned*”, “*La letero estas nun retrosendata*”. En ĉi tiu situacio la Participo NE indikas tempon de la ago, ĉar tiun tempon jam indikas “*IS*”. Jen simila frazo, en kiu la Participo ne indikas la tempon, sed nur la pasivecon: “*The chicken will be eaten during dinner*” (La kokidaĵo estos manĝata dum la vespermanĝo). Ĉar la Participo en tiuj kazoj NE indikas la tempon, ĝi ne estas nek nomiĝas Pasinta Participo (kiel en la dua situacio). sed estas PASIVA PARTICIPO en la angla. Ekzemplo de la Pasinta Participo: “*We have (now) eaten the chicken (yesterday)*”.

Ĉar do en “*The letter is now (being) returned*” “*returned*” ne estas “*Past Participle*” sed “*Passive Participle*”, la angla k.t.p. estas perfekta lingvo en kiu por nuna ago oni uzas nunajn verbojn. Konsekvence la angla k.t.p. havas tri participojn: la Prezenca (*returning*), la Pasinta (*returned*) kaj la Pasiva (*returned*).

**Marcel Leereveld.**

## 3ZZZ

La elsendo de la 1a de marto 2021 informas pri la Esperanto-movado, arto kaj transdonas recenzon de novelo de Waclaw Sieroszewski tradukita de Kabe . La teamo de 3ZZZ petas la esperantistojn, kiuj ne renovigis sian membrecon al 3ZZZ, fari tion ĉar je la momento ni ne atingas la devigan nombron por havi la rajton elsendi. Antaŭdankon al ili.

**Franciska Toubale**



**SOLVO DE LA KVIZETO:** Estas neniu gramatikaj eraroj en la kvizeto. **Marcel**

La kialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**